Año X (N.º 107)

Núm. 1

# Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

ENERO FEBRERO 1958

PELAYO, 7 VALENCIA (ESPAÑA)

## AÑO NUEVO

**En los albores de este nuevo año, los esperantistas españoles se enfrentan, además, con el inicio de una nueva década en su evolución social, enfrentándose con nuevos problemas, añadidos a los existentes, desde el primer decenio de la fundación de la Federación Española de Esperanto.**

**Mucho es lo conseguido en la etapa anterior: fundación, legalización, difusión y consecución del aprecio y estimación de los esperantistas en toda España, así como la conquista de un sólido prestigio en los medios esperantistas de todo el mundo.**

**Pero, con ser mucho, resulta poco lo enunciado si lo cotejamos con el nivel de nuestras aspiraciones, que son al propio tiempo los requisitos mínimos para una decorosa existencia, teniendo en cuenta la alta significación de nuestro programa cultural y social. En primer lugar, resulta todavía microscópico, por no decir ridículo, el número de nuestros afiliados, ya que para considerarlo digno del glorioso pasado del esperantismo en España, así como de nuestros esfuerzos actuales, debiera ser, por lo menos, triple o cuádruple de lo que es; con lo que nuestra marcha social podría desarrollarse más dignamente y con menos penuria económica. Esto podría vencerse en gran parte, si todos los esperantistas españoles comprendieran la absoluta necesidad de afiliarse, para que su esperantismo dejase de ser algo estéril y egoista.**

**Fuera de nuestro ambiente radican, y no en pequeña monta, multitud de causas de la lentitud evolutiva de nuestro programa idiomático: La falta de apoyo y comprensión en las altas esferas, la indiferencia de las nuevas generaciones hacia toda idea generosa, máxime si ella lleva aparejada la necesidad de estudiar algo, cuyo conocimiento no proporcione inmediato beneficio económico, y la anacrónica persistencia de ciertos prejuicios, que obstaculizan la marcha progresiva que sin embargo el Esperanto efectúa. Solo el entusiasmo, la constancia y el deseo de alcanzar un alto nivel en la utilización del Idioma Internacional, y la comprensión de qué cada uno de nosotros tiene el deber de centuplicar sus esfuerzos para difundirlo y enaltecerlo, pueden contrarrestar el maléfico influjo de las causas antes citadas.**

**Por ello, todo esperantista español debe imponerse, al comenzar el nuevo año, la ineludible tarea de considerarse apóstol, embajador y paladín de este segundo lenguaje nuestro, fácil, neutral y bello, en una pieza, mediante el cual la humanidad podrá encontrar un camino más grato y más eficiente en el logro de esa paz tan ansiada por todos.**

De la sección «Vox Populi» en el diario LEVANTE de Valencia

### *SOBRE LOS TURISTAS Y LAS OFICINAS DE CORREOS*

«¿Es tan difícil solucionar el problema que supone a los extranjeros acercarse a las ventanillas de centros oficiales, tales como Correos o Telégrafos, donde se anuncia «Internacional» y que no puedan entenderse con los empleados?

Lo he observado en algunas ocasiones, y, a pesar de lo lamentable, resulta algo bastante cómico verlos gesticular.» — S. F.

**Nova jaro, en sia komenco, estas kvazaŭ loga kovrilo de albumo preta por registri tiun aspiron aŭ deziron, kiu certe donos al nia vivo plenan kontentigon. Homo prudenta tamen scias, ke la atingo de plej dezirata celo ofte dependas de la propra klopodado. Instigante do al laboro, cele al la triumfo de Esperanto, ni opinias esprimi plej trafe tiel la ateston de nia fervoro --varma saluto el koro batanta-- al la hispana kaj tutmonda samideanaro, okaze de alia plia etapo, kiun esperige --kial ne?-- inaŭguras la nova jaro**

# 1958!

# NEOLOGISMOJ

Ofte mi estas konstatinta, en niaj periodaĵoj, protestojn, proponojn, provokojn, diskutojn, mokojn, atakojn, favorajn kaj nefavorajn al akcepto de neologismoj. Nur ne pravas tiuj, kiuj --malsane koleremaj-- rompas la pacan etoson, kiu devus esti normo de la Esperanta Familio.

Kvietiĝu! Mi asertas, ke neologismoj estas necesaj. Ĉiuj vivantaj lingvoj ilin akceptas, Esperanto do subiĝas al la samaj lingvistikaj reguloj. Mi memoras, kiam siatempe, lerte kaj patriotege proponitan de Churchill en la Angla Parlamento, oni aĉetis per 23.000 sterlingaj funtoj la lingvon de Ogden; kaj la kompatinda «Basic English», ĉifone vestita, vivis sian mallongan vivon, almozante, precipe de la franca lingvo, bezonajn vortojn por necesaj esprimoj. Ne. La nombro da vortoj de kompleta lingvo, kiel Esperanto estas, ne povas esti limigata. Por vivi science, metie kaj literature, Esperanto rajtas akcepti ĉiujn novajn terminojn, kiujn aprobos nia Akademio. Sed, ĉu la fundamenta parto de la lingvo povos esti malhelpata de la evolucio? Ĉu ni mem, la interesatoj, povos blinde malutili al niaj propraj deziroj, kontribuante al minado de la Fundamento de Esperanto? Tute ne! Ke tiuj *febla, povra* kaj *trista* ne difektu la zamenhofan verkon, ne tuŝu eĉ memore la zamenhofan entuziasmon, kiam la Majstro, dum strata promenado, rigardis tiujn ŝildojn kun la promesemaj vortoj ***Ŝvejcarskaja*** (Pordistejo) kaj ***Konditorskaja*** (Sukeraĵejo).

La fundamenta Esperanto apartenas al la popolo, al tiu homamaso, kiu vivas ekster la flugadoj de la pli alta kulturo. Esperanto estas la simpla rimedo por internaciaj rilatoj, por ĝenerala interkompreniĝo, estas tiu el kiu ni, en plena konvinko, esperas estontan definitivan mondpacon. Al tiu ĉi ne konvenas konfuzaj neologismoj, sed ja la absoluta profito, kiu alvenas el la aglutina sistemo. Al Esperanto ne interesas, ke komencantoj taksu la riĉecon de la lingvo pro la nombro de ĝiaj esprimiloj, sed ja konstatu tiun riĉecon per la praktika, klara kaj simpla maniero, kiel la esprimoj povas esti tradukataj per ĝi.

La Fundamento de Esperanto estas vere neŝanĝebla donaco de Zamenhof al la ĉiumondaj popoloj; ne al kleruloj, kies agado --ni bone scias-- nemalofte ŝajnas suspektinda. En la eklernigo de Esperanto ni uzu la fundamentan regularon, ni kontaktigu la eklernanton kun la simpla gramatiko kaj la simpla vortareto, kun la neceso kaj sufiĉo de nia popola lingvo. Li mem poste, siatempe, adoptos eventuale kaj oportune novajn permesitajn vortojn. Sed tio pli malfrue, kiam li estos tralegINta antaŭen kaj retroen la Fundamenton de Esperanto.

Nur poste, vivu la neologismoj!...

**SALDANHA CARREIRA — Lisboa**

# La Roza Raŭpo

Ili kviete iras sur la vojeto --inter du vicoj da kverkoj-- kaj en iliaj brilantaj okuloj dancas la ĝojo.

Ĉirkaŭ la radiaj gefianĉoj flugetas la papilioj; lacerto malpli riskema kaŝas sian kapon sub la herbo. Tute proksime, akvo delikate kantas; pli supre, birdoj ludas. Iom pli malproksime, leporo forkuras en la arbustaron, kaj ĉie la vento palpas la branĉojn. Subite, la junulino krias pro teruro. Ŝi malantaŭenpaŝas kun abomeno, ĉar ŝi vidis raŭpon.

Sed li, tute kviete konsideras la besteton.

—Mi interesiĝas pri raŭpoj. Kion? jen roza korpo kun nigraj punktoj. Mi konas ĝin, ĝi estas tre malkomuna. Mi prenos ĝin...

—Ne, ĝi naŭzas min. Lasu ĝin, venu!

—Tamen, karulino, ĉi tiu raŭpo baldaŭ estos krizalido, poste papilio. Kaj la vermo fariĝos elfino. Vi komprenas, ĉu ne?

Ŝi staras furioza.

—Mi ne volas aŭdi plu. Venu!

—Vi ŝercas!

—Lasu ĝin, aŭ mi foriros...

La junulo rigardas la grasan raŭpon, kiu baldaŭ fariĝos papilio, poste sian amatinon, kiu nun havas vizaĝon tute malbelan, pro kolero, eĉ pli malbelan ol tiu de la raŭpo. Sed, certe, ŝi neniam fariĝos papilio. Tiam li diras:

—Mi prenos la raŭpon!

Ŝi foriris; kaj tiu malgranda okazaĵo sufiĉis por estingi ilian pasion kaj detrui ilian konstantecon.

En la arbaro, geamantoj flustras; sed ie, sur la vojeto, roza raŭpo rampas...

**Héléne GUERLAND**

# REMEMORE AL NIAJ KONGRESOJ: de la 7-a en Seviljo al la 18-a en Madrido

**Personaj impresoj de partopreninto en ambaŭ naciaj kunvenoj**

Kun kelkaj amikoj, pli malpli aktivaj esperantistoj, mi ekiris el Jaén por partopreni la 7-an Kongreson, kiu okazis en Seviljo dum la jaro 1928. Mi profitis la ŝancon por kontroli, ĉu mi estas kapabla paroli la lingvon, ke oni min komprenas kaj ke ankaŭ mi povas kompreni la aliajn. Mi timis, ke tiu espero mia estis nur delogaĵo, ĉar ankoraŭ ĝis tiam mi ne povis efektivigi tiun kontrolon.

Mi devas konfesi, ke la pruvo estis sufiĉe kontentiga. Vere, mi ne rajtis fanfaroni, kiel lingva kompetentulo, sed almenaŭ mi ne fiaskis, kiel diskreta meza *babilulo.* Mi partoprenis en laborkunsidoj, festoj, ekskursoj k. t. p. Mi ĝuis variajn amuzaĵojn, kiujn entuziasme kaj lerte organizis la Kongreskomitato, kio pruvis al mi, ke tiutempe Esperanto jam estis serioza afero, inda je diligenta okupado. Mi revenis hejmen tre kontenta, kun la ideo kaj deziro ĉeesti en ĉiuj postaj Esperanto-Kongresoj. Sed, laŭ popola diro: «Homo proponas kaj nur Dio disponas». Do, ne plu mi povis efektivigi tiun deziron ĝis antaŭ nelonge, okaze de la 18-a Kongreso en Madrido, tiel bonege aranĝita, ke ĝi ebligis al ĉiuj partoprenintoj ĝui dum tuta semajno tiom da agrablaĵoj, ke ili estos --almenaŭ por mi-- neforgeseblaj. Pri ambaŭ kongresoj --tre malproksima unu de la alia-- miaj personaj impresoj jenas: La unua estis pli brua ol praktike laborprofita; tiu okazinta en Madrido estis multege pli utila je ĉiuj vidpunktoj: lingva, organiza, propaganda kaj amuza, akorde kun la plej modernaj postuloj.

Kompreneble, mi devas konsideri, ke la tempo, la medio kaj la cirkonstancoj ne estis la samaj. Oni devas ankaŭ agnoski, ke sen la unuaj ŝtupoj ne ekzistas ŝtuparo; eĉ malgraŭ tio, ke la unuaj ŝtupoj estis maldelikate konstruitaj, ĉar la tiamaj materialoj ne estis tiel taŭgaj, kiel tiuj nuntempe disponeblaj. Tial, antaŭen! Ni ĉiuj kune alportu, laŭ nia eblo, NIAN BRIKON por finkonstrui la belan palacon, kiun ni deziras posedi por Esperanto en nia kara Hispanlando, pruvante tiel al plej fortaj skeptikuloj, ke nia idealo ne estas utopia revo nek vana distraĵo, sed tute serioza tasko por solvi la gravan socian problemon de lingva interkomprenigo, kiu pli kaj pli aktualiĝas kaj por kiu nia karega Majstro D-ro Zamenhof trovis solvon pere de sia genia Esperanto.

J. ANGUITA (Jaén)

---

# INTERLINGVA PARALELO

| ORIGINALO | TRADUKO |
| --- | --- |
| **EL REINO DE LAS ALMAS** | **LA REGNO DE LA ANIMOJ** |
| **La noche amorosa sobre los amantes** | La nokt' amfavora surŝirmas l' amantojn |
| **tiende de su cielo el dosel nupcial.** | Per sia ĉiela edziĝo-mantel', |
| **La noche ha prendido sus claros diamantes** | Plej brilajn alkroĉis la nokt' diamantojn |
| **en el terciopelo de un cielo estival.** | Al sia velur' el somera ĉiel'. |
| **El jardín en sombra no tiene colores** | Ĉe l'ombra ĝardeno ne estas koloroj |
| **y es en el misterio de su obscuridad,** | En tiu mistera malluma ĉi hor', |
| **susurro el follaje, aroma las flores,** | Susuras la branĉoj, odoras plej floroj |
| **y amor... un deseo dulce de llorar.** | Kaj am' estas milda deziro de plor'. |
| **La voz que suspira y la voz que canta** | La voĉ', kiu tremas; la voĉo kantanta, |
| **y la voz que dice palabras de amor,** | La voĉ', kiun igas vibradi l'amtrem' |
| **impiedad parecen en la noche santa,** | En nokt' plej malpie ĝi estas sonanta |
| **como una blasfemia entre una oración.** | Nur kvazaŭ kun preĝoj miksita blasfem'. |
| **¡Alma del silencio que yo reverencio,** | Anim' de l' silento, la plej eminenta, |
| **tiene tu silencio la inefable voz** | Ĉar via silento nur estas la vort' |
| **de los que murieron amando en silencio,** | De kiuj formortis en amo silenta, |
| **de los que callaron muriendo de amor!** | De kiuj silentis en ama la mort'. |
| **¡De los que en la vida por amarnos mucho** | De kiuj, amante nin ege dumvive, |
| **tal vez no supieron su amor expresar!** | Ne sciis esprimi l' amegon al ni. |
| **¿No es la voz acaso que en la noche escucho** | Ĉu tiu nokt-voĉo nur sonas fiktive, |
| **y cuando amor dice, dice eternidad?** | Kaj amon, eternon, ne diras al ni? |

Oni ne kutimas --ĉar ofte tre maloportune-- paraleligi tradukon de versaĵo kun la originalo. Tamen, kuraĝe kaj plenfide, ni faras tion prezentante, kune kun la originalo, la klaran kaj fidelan tradukon, kiun faris nia jam forpasinta karmemora samideano, kolonelo Vicente Inglada, antaŭ multe da jaroj, de la ĉarma poemeto, kiun la fama dramverkisto Jacinto Benavente enŝovis en sian komedion «La Kreitaj Profitoj» ankaŭ komplete tradukita.

## PRI ARTEFARIT

La unua artefarita satelito estas menciita en romano, eldonita fine de la pasinta jarcento. Ties protagonistoj vojaĝas al la planedoj kaj tial, ke la spacoŝipo, por forflugi el la Tero, konsumas preskaŭ la tutan brulŝargon, ili bezonas provizejon por daŭrigi sian vojaĝon. Inter la romanverkistoj, la temo pri vojaĝoj al la astroj estis tre ŝatata. La franco Jules Verne publikigis en 1865 sian verkon «Vojaĝo al la Luno», kiu estas menciita en multaj verkoj pri astronaŭtiko. Tiun ĉi vorton mem oni ŝuldas al la romanverkisto Rosny. En la XVII$^{a}$ jarcento, aperis pluraj romanoj pri tiu temo, kvankam iliaj aŭtoroj fakte intencis kritiki homajn malvirtojn, kiujn ili atribuis al la loĝantoj de la vizititaj planedoj. Tamen, la plej antikva romano pri vojaĝoj al la astroj aperis en la jaro 160 p. K. Ĝia aŭtoro estis la greka satiristo Luciano el Samosata. Tiu temo, elkovita inter romanverkistoj, transiris al la scienculoj. Goddard en Usono kaj Oberth en Germanujo laboris pri ĝi dum la dua jardeko de nia jarcento; kaj iliaj verkoj, fundamentaj por la astronaŭtiko, aperis respektive en 1919 kaj 1923. La problemo pri la ekforflugo el la Tero ŝajnas simpla. Sufiĉas komuniki al la vojaĝonta veturilo la tielnomatan *rapidecon de forflugo,* kiu estas malsama laŭ la astro.

Ĉe la Tero ĝi estas po 11'2 Km. ĉiusekunde. Ties efektivigo prezentas ja gravajn malfacilaĵojn. Supozante, ke oni atingus tiun ĉi rapidecon, la puŝo suferata de la vojaĝantoj, ĉe la ekiro, samvalorus 25000-oblon de iliaj pezoj, t. e. homo pezanta 50 kilogramojn kvazaŭpezus 1 $1/2$ milionojn da kilogramoj, sufiĉege por subita platiĝo. Plie, je rapideco po 11'2 Km. ĉiusekunde, la rezisto de la aero efikus same kiel la smirgopapero, kontraŭ kiu oni frotas alumeton, kiel oni vidas ĉe la falsteloj. La veturilo flamiĝus. En sia aludita romano, Jules Verne preteratentis ĉi tiujn cirkonstancojn; aliamaniere li ne povus daŭrigi sian rakonton. La problemo de la astronaŭtiko estas vere solvita per raketo, ĉar tiu ĉi ilo posedas akcelatan movon, kies daŭro ebligas, ke la homa korpo alkutimiĝu al la puŝrapideco, precipe dank' al la multoblaj pluretaĝaj raketoj. Kiam la unua etaĝo forbruligis sian tutan brulaĵon, tiu etaĝo demetiĝas kaj la sekvanta etaĝo aŭ apuda raketo ekfunkcias. Tio ĉi okazas, kiam la unua etaĝo atingis sian plej grandan rapidecon. La dua etaĝo aldonas sian propran rapidecon al tiu de la unua; kaj la menciita puŝado nun estas, ne la sumo de ambaŭ puŝadoj, sed nur la puŝado de la dua etaĝo. Por lokigi siajn satelitojn en iliajn orbitojn, la sovetaj sciencistoj ankaŭ uzis trietaĝajn raketojn.

Kiam la satelito atingas la deziratan altecon, oni komunikas al ĝi tangentan puŝon, laŭ la forto kaj direkto konvenaj, por ke ĝi flugu laŭ sia orbito ĉirkaŭ la Tero. Tiam, du fortoj agas al ĝi: tiu de elforkuro, pro la ricevita puŝo, kaj tiu de la gravito altiranta ĝin al la

---

**GRAVA FAKA REVUO** «Técnica Económica» (Ekonomia Tekniko) kun eldonkvanto de 6500 ekzempleroj, organo de «Asocio de Komerco-Teknikaj Diplomitoj» petis artikolon pri Esperanto al nia Delegito en Pontevedra; tiu kontribuaĵo, tre altvalora kaj objektiva, aperis en la novembra numero. Estas oportune, ke multaj samideanoj enlandaj kaj eksterlandaj --precipe se oni estas samfakulo-- skribu rekte al la redakcio de «Técnica Económica», Calle Orellana, 5, MADRID, petante informojn kun salutoj kaj dankoj.

**NOTA.—Este artículo fué pagado con 575 pesetas a su autor el Sr. Antonio Alonso Núñez, quien ha enviado dicha cantidad a la Federación, para los fines que se estime oportunos**

---

## XIX CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO ● Castellón 24-27 Julio 1958

La Federación Española de Esperanto ha encontrado ya el nuevo eslabón en la cadena de sus fructíferos congresos. Después del éxito alcanzado en el últimamente celebrado en Madrid, la Federación ha querido organizar el próximo en una ciudad donde, en otro tiempo, el esperantismo florecía satisfactoriamente y hoy, en cambio, languidece. Precisa reavivar la llama del entusiasmo; el reducido número de amigos que allí perdura, animados por la Federación, está dispuesto a hacer milagros para que el éxito corone el XIX Congreso.

Castellón de la Plana, riente y atractiva ciudad mediterránea, rodeada de frondosos naranjales, junto a nuestro mar azul --cuya brisa atempera el suave clima veraniego-- ofrecerá a los congresistas un acogedor ambiente, en el que se podrán hermanar las tareas, en pro de nuestro ideal idiomático, con el interés turístico de los incomparables alrededores de la bella ciudad de la Plana. En efecto: las hermosas playas de Benicasim y Oropesa, el histórico y pintoresco peñón de Peñíscola, recientemente popularizado por

Tero. Sen la gravito, la satelito forirus al la spaco, tamen la gravito modifas ĝian vojon kaj ĝin konservas ĉe la distanco antaŭfiksita al ĝia orbito. Tiu ĉi vojo estas ne perfekte cirkla, sed elipsa kaj ne tre ekscentra; pruvas tion la fakto, ke ĉe sia pligranda malproksimeco, la «Sputnik» estis ĉe 900 Km. super la marnivelo kaj ĉe la plej malgranda ĉe 200 Km. proksimume. En ĉi tiu alteco, la atmosfero ne estas tiel maldensega, kiel ĉe la alia, kaj ĝi prezentas pli da rezisto al la satelito. La sinsekva sumo de tiuj ĉi rezistadoj malgrandigas la tangentan rapidecon, kaj la gravito efikas pli kaj pli, ĝis la satelito eniras pli densajn regionojn de la atmosfero, en kiuj la rezistovarmo flamigas ĝin.

Tio estas, kion oni jam efektivigis. La 4-an de Oktobro, koincidante kun la VIII[a] Internacia Kongreso de Astronaŭtiko, okazinta en Barcelono kaj organizita de la «Agrupación Astronáutica Española», la rusaj sciencistoj lanĉis sian «Sputnik I» kun radiosendilo kaj baterio da sekaj piloj, kaj komence de Novembro tiun «Sputnik II» kun radiosendilo, diversaj aparatoj kaj hundino. Tamen, ankaŭ scienculoj ŝatas fantazii. La unuaj projektoj de artefarita satelito, de Noordung kaj von Braun, estis grandaj spacaj stacidomoj kun ŝipanaro; poste, ĉar la stato de la tekniko ne ebligis efektivigi tion, von Braun publikigis alian projekton de malgranda satelito kun simioj. Tria projekto, ankoraŭ pli modesta, estis tiu de Singer, konsistanta en sfero de 90 centimetroj je diametro kaj fine, tiu de Nicollet, kies mezuro estas nur 50 centimetroj.

Jen estas, resumite, la nuna stato de la Astronaŭtiko, kies disvolviĝon oni ne povas antaŭvidi. Kiam, en la jaro 1906, Santos Dumont per rudimenta aeroplano flugis je unu metro da alteco kaj dek metroj da distanco, ĉu tiam estis eble antaŭvidi la nunan prosperon de la homa flugarto? Al homoj dezirantaj la bonon de la homaro, ĉi tiu historio estas sendube esperiga. Tamen ankaŭ instruplena, ĉar ĝi pruvas ke, kiom ajn la homaro progresas, ĉiu materia aŭ morala progreso nepre devas baziĝi sur la kono kaj apliko de la leĝoj de la naturo. Prave oni diras, ke oni venkas la naturon nur per obeo al ĝiaj leĝoj.

Kiel Zamenhof sukcesis krei Esperanton, obeante la naturleĝojn de la filologio; nur per obeo al la naturleĝoj, regantaj la homan socion, oni povas esperi, ke la homaro akordigos iam la materian progreson kun la moralaj bezonoj, aplikante nur por la bono de la homaro la mirindan povon de la scienco kaj la tekniko.

**ANTONIO PALUZIE BORRELL**
Sekretario de la «Sociedad Astronómica de España y América»,
Voĉdonanto de la «Agrupación Astronáutica Española».

---

una afortunada película, son motivos que por sí solos justifican el desplazamiento a este deslumbrante paraje de la Región Valenciana. El entusiasmo y la capacidad de los esperantistas de Castellón suplirá con creces la parquedad de su número. Y como fruto de sus trabajos preparatorios, he aquí el Programa Provisional que han elaborado:

**JUEVES, 24 de Julio**

- **19. Recepción de congresistas.**
- **23. Verbena en el Parque.**

**VIERNES, 25 (San Jaime)**

- **10. Misa y sermón en Esperanto.**
- **11. Fotografía colectiva.**
- **12. Recepción en el Ayuntamiento**
- **18. Apertura del Congreso.**
- **20. Conferencia.**

**SABADO, 26**

- **10. Sesión de trabajo.**
- **12. Exámenes.**
- **17. Sesión de trabajo.**
- **19. Conferencia.**
- **25. Fiesta Literaria.**

**DOMINGO, 27**

- **9. Misa en la ermita de la Magdalena.**
- **10. Visita a la playa de Benicasim.**
- **11. Excursión a Peñíscola, hasta 8 tarde**
- **20. Banquete Oficial.**
- **24. Bailes populares.**
- **1. Baile.**

**LUNES, 28**

- **8. Excursión a Morella (facultativa)**

Este es el programa que, con el beneplácito de las autoridades locales y el esfuerzo del Comité Organizador, renovará los éxitos ya tradicionales de nuestros congresos. Como ya hemos dicho, se ha logrado montar un alojamiento colectivo gratuito, por cuyo servicio ningún esperantista español podrá alegar penuria para faltar al XIX Congreso. La baratura de la vida en Castellón completará el aliciente para que este congreso registre el mayor número de asistentes hasta ahora conocido.

En el próximo BOLETIN (primeros de Marzo) llegarán las hojas de inscripción.

**Ju pli peniga estas la laboro de talentulo, des pli bona rezultas la produkto! — PETRO STOJAN**

## NI RIDU, KOSTE DE LA MONO...

En stacidomo, servisto redonas al sinjorino mansaketon, kiun ŝi forgesis en kupeo de vagonaro.

—Ĉu vi bonvolas nun, sinjorino, diri al mi kiom da mono troviĝas en la mansaketo? —demandis la servisto.

La sinjorino, post esploro, volonte diris la kvanton; kaj la servisto notis ĝin malsupre de longa kolono en kajereto, kiun li tiris el la poŝo.

—Mi faras tion, por kalkuli kiom da mono kostas al mi la honesteco.

—

En strando, sinjoro rimarkas, ke en la maro dronas virino, kiun li opinias sia edzino. Alarmite, li vokas membron de la savbrigado:

—Mi donos al vi kvincent pesetojn, se vi savas mian edzinon!

La naĝisto ĵetas sin en la maron; kaj, post momento, li revenas kun senkonscia virino ĉe la brakoj.

—Jen via edzino, mi atendas do la promesitan rekompencon.

—Jes, mi promesis kvincent pesetojn por la savo de mia edzino; sed, ĉi tiu virino estas... mia bopatrino!

—Nu, komprenite —diris la naĝisto— Kiom mi ŝuldas al vi?

—

Kuracisto konsilas al kliento:

—Ne zorgu tiom multe pri mono. Ĝuste antaŭ unu monato, alia kliento ne povis dormi, tial ke daŭre li memoris pri mono, kiun li ŝuldis al sia tajloro. Mi konsilis al li absolute forgesi tion, kaj nun li vivas tre feliĉe.

—Efektive, doktoro, mi konas ja tiun kazon, kiu portis min al la nuna stato, ĉar bedaŭrinde mi estas la tajloro...

## SFINKSA ANGULETO

### LA UNUA LITERO

Serĉu kvarliteran vorton, kiu donas nomon al parto de la homa korpo. Se oni ŝanĝas la unuan literon, oni formos laŭvice vortojn, kiuj estas nomoj por rondaĵo, knabeto, necerteco, forĵetaĵo, akvovaporo kaj ludilo.

Ĝusta solvo gajnos unu poenton ĝis 1. Marto.

**SOLVO PRI LA KRESKANTAJ VORTOJ**
EN LA PASINTA NUMERO
O - RO - ERO - TERO - ETERO - LETERO

**La malamo malkovras multajn difektojn, kiujn la amo kovris.**
*Leonardo de Vinci*

## TRO DA BRUO ESTAS DANĜERO

Fonacio estas la unuo por la skalo de sonoj. La brueto de foliaro ĉe la arboj, pro venteto, egalas al 20 fonacioj. Strato kun ordinara trafiko, sen veturiloj, 40. La muziko de radioaparato, kun meza tono, 50. La klavoj de skribmaŝino, dum plej vigla funkciado, 70. Fabriko meze de intensa laborado, 130.

Ekspertoj asertas, ke la danĝero estiĝas de post la 70 fonacioj. Laŭ tio, en laborejoj kaj oficejoj, oni devas klopodi, ke la bruo estu kiel eble plej malgranda, kio efikos tre bone, ne nur por la sano de laboristoj kaj oficistoj, sed ankaŭ por la kresko de la koncerna produktado.

Certe, la bruo estas unu el la plej malutilaj kaj malagrablaj agentoj, kiun ni devas pagi al la moderna vivo.

*La vivo estas daŭra marĉandado kun la morto.*
GREGORIO MARAÑÓN

## SOS(x)

Aŭskultu SOS-on el teritorio
de subevoluinta *Blinkenbergio!*
La plej klarajn faktojn kleruloj ignoras
--ĉilande laŭ Ŝekspiro io fetoras.

Kleruloj aplikas taktikon senhontan:
per mok' ridindigi la lingvon tutmondan.
Sed staras ridindaj post misinterveno
nur Blinkenberg kaj la kolego Nilseno.

Sed kial okazas do tiaj obstakloj
ĉe homoj kun skribo-- kaj legokapabloj?
Ĉu kulpas la kleraj senditoj de danoj
aŭ eble malklero ĉe samideanoj?

En ambaŭ okazoj SOS-on ni voku:
La tempo nun for, kiam «klero» nin moku!
Per ĝustaj informoj en ĝusta okazo
aktivu... kaj ĉesos por moko la bazo.

**POUL THORSEN,** Kopenhago

(x) Respondo al tasko: Faru alvokon al teritorio, kie nia lingvo estas ankoraŭ nemulte konata.

# NOVAJ LIBROJ SUB LA EFIKO DE Kritiko

**JAPANAJ FABELOJ** — Dua eldono reviziita de Teruo Mikami. Dediĉas Kotohiko Makubara. En eldono de Amo — Akademio: Tenmori, Kozoĵi, Aiĉiken (Japanujo). 60 paĝoj kun aldono de 5 intermetitaj ilustraĵoj.

Ĉiam estas ĝoje saluti la aperon de verkoj orientlandaj, en la konstelacio de nia esperanta literaturo, ĉar ili vekas en ni deziron ekkoni la civilizon kaj kulturon de malproksimaj regionoj, kiuj dancas en nia fantazio, kiel libeloj de sorĉo nin ĉirkaŭvolvantaj per sia reto el mirindaĵoj. Pro tio, hodiaŭ, havante antaŭ mi la verkon pri kiu mi raportas, kiu cetere estas dua eldono, reviziita, de tiu unua aperinta en 1933[a] kaj jam elĉerpita, mi eksentis veran plezuron; kaj unutire mi tralegis la enhavon. Ĝi estas libro de fabeloj, kaj ni jam scias, ke tiaspecaj literaturaĵoj ĝenerale travidebligas la animon de la popolo, kiu ilin kreis, kun ĝiaj tradicioj, moroj kaj mitoj. Ĝi konsistas, krom el la enkonduko kaj antaŭparolo, el kvin malnovaj popolfabeloj, «kiuj naskiĝis en la japana gento. pratempe, iom post iom, sinsekve post la mitologiaj tempoj» kaj kiuj estis parole transdonitaj «generacion post generacio el la prahistoria tempo» al la aktuala epoko, kiam ankoraŭ ili ĝuas inter la popolo grandan estimon kaj favoron. Ĉiu fabelo antaŭhavas sian koncernan bildon, desegnitan kaj plurnuance kolorigitan laŭ iama karakteriza stilo de la japana arto.

La verko estas propra por infanoj; tamen la grandaĝuloj povas ankaŭ frandi la delikatecon de la priskriboj kaj bildoj. Ĝia lingvaĵo estas --mi povus diri-- modela kaj la fabeloj, kvankam simplaj kaj naivaj, posedas freŝecon kaj ĉarmon. Domaĝe, ke la verko nur ampleksas kvin fabelojn, kaj akre sentiĝas en ĝi la manko de kelkaj aliaj, egale interesaj, da kiuj la japana beletristiko verŝajne sin trovas saturita, kiuj estus taŭge kompletigintaj la formadon de ampleksa volumo, kapabla doni al si kategorion kaj pli altan valornivelon.

Presita sur bonkvalita dika papero, kaj en klara tipografia stilo, ĝi montras sur la kovrilo unu el la kvin internaj ilustraĵoj; sed bedaŭrinde ĝi vidiĝas makuletita de kelkaj enŝoviĝintaj preseraroj, kiujn mi konsilas formeti en nova eldono. Konklude: la verko plaĉas kaj estas rekomendinda tiel al la infanoj, kiel al la pliaĝuloj.

**JOSE VENTURA** (Tarrasa)

---

**EKRIGARDO AL BUDHISMO** — Broŝuro eldonita de Budhana Ligo Esperantista, laŭ kolektiva traduko el anglalingva traktato de D-ro R. L. Soni. 47 paĝoj. Prezo: 9 pencoj. Specialaj prezoj por dek ekz. aŭ pli grandaj kvantoj. (La sendkostoj ne estas inkluzivaj). Mendebla ĉe F-ino M. E. Bowden. «Clarach», Abbey Drive, Gronant, Prestatyn.— North Wales (Britujo).

En ĉi tiu libreto, D-ro Soni vivece rakontas pri kelkaj fundamentaj doktrinoj de Budhismo, kun observoj pri la influo de la instruoj sur la Homaro, en la pasinteco, kaj iliaj implikoj en la hodiaŭa kaj eĉ en la morgaŭa mondo.

Malgraŭ tio, ke nia filozofia kriterio ne tute konkordas kun la Budhismo, mi multe ĝojas, ke Esperanto iĝas ponto inter la orienta kaj okcidenta kulturoj, ĉar ĝuste tiel la internacia lingvo montras sian praktikecon kaj nediskuteblan taŭgecon. Sekve, la doktrina enhavo de la verketo aperas klara kaj tute komprenebla. Ĝia etika kodo estas noblega kaj konvinkiga. Kiel specimeno, jen la Dek Eroj de ĝia programo: 1 — Malavareco. 2 -- Moraleco. 3 -- Apartigo de voluptaj deziroj. 4 — Saĝeco. 5 — Heroa klopodado. 6 — Pacienco. 7 — Verdiremo. 8 — Fervora Volo. 9 — Universala bonkoreco kaj 10 — Trankvileco.

Plue, D-ro Soni deklaras: «ke, sen la sentoj de universa amo, paco ne povas esti sur la tero. Budhismo instruas senliman kompaton, kiu ne allasas limojn de ***raso, nacio*** aŭ ***speco***». Vidu do, kiel la supre citita kodo plene identiĝas kun la celoj kaj interna ideo de la esperantismo.

Mi elkore deziras, ke tiel luma spirita mesaĝo hele penetru en la universalan konscion, por efike pacigi la tutan mondon, plenumante la dezirojn de la verkisto, nome: «Pacon al ĉiuj estaĵoj!»

La lingvo, ĝenerale, estas korekta. Mi povus fari nur etajn rimarkojn, kiuj malmulte gravus antaŭ la bona stilo de la verko.

**JAIME ARAGAY** (Barcelono)

---

**Nur per sia literaturo, popolo montras la nivelon de sia kulturo!**

## POLA KONGRESO EN DANZIG

*Granda sukceso estis la 14-a tutpola Esperanto-Kongreso, okazinta la 5-an kaj 6-an de Oktobro 1957, en Gdansk (Danzig).*

*La solena malfermo okazis en Aŭlo de Politekniko, kaj ĉeestis ĉirkaŭ 500 personoj, el ĉiuj plej gravaj urboj el Pollando. Fine de la laboro en la unua tago, okazis granda koncerto en Popola Filharmonio, kun tre bonaj artistoj kaj belega programo. En la dua kongrestago, oni kunsidis en apartaj sekcioj: turismo, ĵurnalismo, propagando, ktp. La Kongreso disvolviĝis en agrabla kaj sincera atmosfero, kio pli forte ligis ĉiujn esperantistojn.*

Danuta Czernik - Lublin

---

## SAMIDEANA VIVO

La 26-an de pasinta Aŭgusto, edziĝis en Sabadell S-ro E. Esteve Viladoms kun Adelina Codina. Sinceran gratulon!

—

En la hejmo de niaj gesamideanoj Oscar Corrons kaj M.a Angeles Esparza regas ĝojo pro naskiĝo de dua fileto, kiu certe stimulos la esperantistiĝon de sia unua frateto, kiu, sole nur trijara, jam tre bone scias prononci eĉ la vorton *ŝranko*, inter multaj aliaj. Koran gratulon!

---

**Prosperon kaj feliĉon en la Nova Jaro 1958°**

deziras al ĉiuj siaj estimataj geamikoj

Izak kaj Alida Schoon kun filino Henny kaj edzo

OOIEVAARSTRAAT, 9

**HAARLEM - N (Nederlando)**

## TESORERIA

En el sorteo del 21 de Diciembre, por el número 53.414, fué agraciado con las 250 pesetas el Sr. Darío Rodríguez, encargado de «Gazetara kaj Radia Servo», de Madrid, por su número 14.

---

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a Diciembre de 1957)

| | | |
|---|---|---|
| Suma anterior | 4.875 | Ptas. |
| H. Bakker - Amsterdam | 50 | » |
| A. Pérez Saura - Valencia | 5 | » |
| O. Corrons - Valencia | 5 | » |
| G. Lenaers - Valencia | 15 | » |
| R. Herrero - Valencia | 50 | » |
| Total | 5.000 | » |

*Así que, la bonita y redonda cifra de* MIL DUROS *sirve de vistoso broche para cerrar el año. ¡Muchas gracias y... a superarse incansablemente en el que ahora empieza!*

## KORESPONDADO

20-jara, studento dez. koresp. kun hispanaj amikinoj, pri diversaj temoj, kaj interŝanĝi p. m., p. k. kaj aliaj aĵoj.
Skribu al S-ro Rak Tadeurz, CHORZOW 6, Armii Czerwonej, 105 (Pollando)

—

18-jara liceano ege deziras korespondi kun hispana knab(in)o pri diversaj temoj.
Skribu al S-ro Kielinski Ryszard Kopernika, 9 - ELBIAG (Pollando)

—

30-jara kemio-inĝeniero dez. trovi hispanan korespondantinon, kiu helpus al li koni la hispanajn lingvon kaj landon.
Skribu al S-ro Zdzistaw Bteszynski, ul. Swiercrewskiego, 131 m. 188 WARSZAWA, 31 (Pollando)

—

Deziras korespondi kun hispanaj fraŭlinoj, per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj, S-ro Ary Melo, Rua Rui Barbosa, 816-N TERESINA - Piauí (Brazilo)

—

Deziras koresp. kun samideanoj el Afriko, pri moroj, kutimoj kaj ekonomia vivo, S-ro Koljo Najdenov. str. Ljuben Karavelov, 33 - FIRNOVO ◇ (Bulgario)

—

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, F-ino Penka Kantarĵieva str. Karaminhov, 5 - FIRNOVO (Bulgario)

—

20-jara hispana fraŭlo, studento, deziras korespondi kun la tuta mondo.
Skribu al S-ro Alejandro Moreyra, str. Dr. Nácher, n.° 13 - CHIVA (Valencia)

---

Samideanoj! Agemaj vendistoj estas tutlande serĉataj por makleri bonkvalitajn varojn, laŭ germanaj patentoj. Skribu detale, nepre indikante regionojn kaj nunajn makleritajn varojn al:
PRODUCTOS ABASA, Torrente del Vidalet, 42 BARCELONA (12) (Hispanio)

---

Aŭskultu la Esperantajn programojn de Ibra Radio, Tanger (Afriko), la lastan mardon en ĉiu monato, je la 20-a horo mezeŭropa tempo. Ondlongoj 19,9 m., 26,5 m. kaj 30,8 m. Bonvolu sendi raportojn al Ibra Radio, Stockholm 1 (Svedujo).

---

**Nia redaktoro LUIS HERNANDEZ kore dankas kaj sincere reciprokas la multajn salutojn, kiujn el diversaj urboj kaj landoj, li ricevis okaze de Kristnasko kaj Nova Jaro**

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA